



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 29/1973 21 nov 1973
Aperas ĉiusemajne

Pilo-Press 1974
Abonprezo 30 GM
Kune kun END 40 GM

Renovigu vian
abonon 1974
jam nun!


Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69
P&K. Nürnberg 819 56-851

Postkongreso 1974

Kronach (pp) La postkongreso 1974, kiu okazos en la nordbavara urbo Kronach, estas en bonaj manoj. La urbestro de tiu urbo, Baptist Hempfling, oficiale transdonis al la urba trafikoficejo la taskon organizi la postkongreson. Per tio la aranĝo fariĝis publika afero. La urbo zorgos pri la programo, la publikaj rilatoj kaj samtempe iomete pri la oficialigo de nia komuna lingvo. Memkompreneble la amikoj de Esperanto en Kronach kunlaboros kun la oficialaj instancoj.

La ĉefo de la urba trafikoficejo, Helmut Goller, kiu ankaŭ estras la familian registrejon, jam antaŭ jaroj studis Esperanton. Al li ni dankŝuldas la esperantlingvan eldonon de la urboprospekto. Unu de siaj oficiŝtoj, s-ano Schedel, vizitis dum tuta periodo la Esperanto-kurson en nia popola altlernejo. En la venontaj tagoj estos fiksitaj la detaloj de la programo.



Esperanta Influgrupo por Premagado

Londono (pp) La Esperanta Influgrupo de Brita Esperanto-Asocio sub la prezido de Ron Coverson eldonis hektografitan broŝuron, kiu instigu la eŭropajn esperantistojn kaj landajn asociojn al komuna agado favore al Esperanto en la Eŭropa Ekonomia Komuno (EEK). La Esperanta Influgrupo estas laŭ la broŝuro "la politika servo de la Eŭropa Esperanto-Centro (EEC); al ĝi estis donita la tasko kunordigi la premagadon en la EEK". La broŝuro entenas la adresojn de ĉiuj membroj de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo de Belĝujo, Britujo, Danlando, Francujo, FRG, Irlando, Italio, Luksemburgio kaj Nederlando. Estas la tasko de la premgrupoj en la unuopaj landoj regule informi la membrojn de la Eŭropa Parlamento pri Esperanto kaj premi la instituciojn de la EEK adopti Esperanton kiel oficialan lingvon kaj antaŭenigi la uzon kaj instruadon de Esperanto kiel ilon por akceli la rapidecon de interkomunikado en la Komuno. Esperanta Influgrupo eldonas Parlamentan Informservon "Novaĵleteraro".

Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo

Kirkel (RH) Kuraĝigita de la sukceso de sia unua semajnfina aranĝo en somero, Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) invitis siajn membrojn, gastojn kaj najbarajn esperantistojn al dua semajnfina kunveno je 27/28 okt 1973 en la naturamika domo de Kirkel. Konsciante pri la malsama nivelo de la partoprenantoj la organizantoj preparis tri paralelajn



programojn: kurson por komencantoj gvidis helpe de lingvistuda kasetaparato Günther Becker, kiu dank al faka sperto kaj lerto komprenis eltenigi la lernantojn dum ses intensaj lecionoj (vd. la foton!) La parolekzerca kaj lega kurso ne efektiviĝis, kvankam ĝia bezono por neperfektuloj estas ekster dubo. Konantoj de la lingvo profitis aŭskultante kaj diskutante plurajn prelegojn:

Reinhard Hauptenthal prezentis la novan Pedagogan Ekzamenon de ILEI emfazante la neceson de fake kompetentaj Esperanto-instruistoj kaj en dua referaĵo

(as) Die Esperanto-Freunde trafen sich übers Wochenende zu einem Seminar im Naturfreundehaus in Kirkel. Hier fanden Vorträge statt, auch Anfänger wurden in die internationale Sprache eingeführt. Auf unserem Foto sind gerade Interessenten dieser Sprache damit beschäftigt, unter Leitung von H. Günther Becker (ganz rechts) die ersten „Gehversuche“ zu unternehmen.

(Foto: Allgayer)

konatigis siajn aŭskultantojn kun la ĉefaj tendencoj de la hodiaŭa literatur-didaktiko. La prezidanto de la ligo, Heinz-Dieter Maas, retrovagis la kursanojn en la historion de Sarlando ĝis 1700 ligante historiajn eventojn kun lingvistikaj eksplikoj. Apartan intereson trovis prelego de GEA-estrarano Hermann Heiß, kiu koncize prezentis la multifacetan agadon de tiu Asocio. La posta diskuto substrekis la gravecon de kulturaj kaj klerigaj aranĝoj de GEA, se ĝi plenumu sian taskon kiel kultura lingva movado. La estrarano tion konsentis.

Apud tiu studa programo (planita prelego de Walter Ehrmantraut pri informatiko estis prokrastita) la ĉeestantoj plezurigis de diapositiva prelego de Manfred Ritthaler pri lia hejmlando Palatinato kaj de promonado tra la fungoriĉa aŭtuna arbaro sub gvido de Jakob Michely. Apud la spirita laboro ne mankis la mangaj plezuroj: la laborkunvenojn inaŭguris kafo kaj kuko, kradrostajo vespera trovis ĝeneralan aplaŭdon kaj ankaŭ la tagmango kontentigis kaj prezindis.

La partoprenantoj trovis, ke tiaspecaj aranĝoj konformas kaj al la aktualaj bezonoj de la Esperanto-movado kaj al la kulissanĝemo de la laborhomoj: la naturamikaĵoj domoj prezentas por tio konvenan kadron. Kun tia certeco jam nun prepariĝas la 3a Esperantista Semajnfino de SEL je 27/28 aprilo 1974.

Verono - Leningrado

Verono (pp/ugra) 200 personoj el Verono, Italio, (nobelularo, deputitoj, Jurnalisto) en la lasta semajno de oktobro vizitis Leningradon kaj Moskvon. Inter ili estis kelkaj esperantistoj, kiuj kontaktis esperantistojn en Leningrado kaj Moskvo. Ili havis tiel okazon por montri al la kunvojaĝantoj la perfektan utilecon de Esperanto en Turismo, ĉar sovetaĵ samideanoj estis daŭre je dispono por vizitoj kaj informoj, dum la aliaĵ havis grandajn lingvajn malfacilaĵojn. Je la fino de la vojaĝo multaj gravuloj decidis studi la internacian lingvon.

Homoj kaj Nomoj



kun kaj sen Renomoj

Pastoro Gerd Brinkmann en solena diservo komence de novembro estis enkondukita kiel 33a pastoro post la reformacio en la Skta Nicolai-preĝejo de Westerland/Sylt. En la posta akcepto kaj kunestado partoprenis ankaŭ Berthold Fischer en la nomo de esperantistoj kaj esprimis siajn bondezirojn en Esperanto. Pastoro Brinkmann, kiu dum 13 jaroj deĵoris en Lengerich, predikos dum la diservo en Esperanto okaze de la UK en Hamburg.

E. Brouwer, direktoro de "British Petroleum", unu el la plej grandaj olerafinejoj en Nederlando, en intervjuo kun tut-nederlanda gazeto "Trouw" diris: "La araboĵ konsciĝis pri sia forto". Kiel ekzemplon E. Brouwer citis, ke en la pasinteco la komunikado kun la arabaj landoj okazis ĉiam en la angla, sed nun subite en la araba.

Prof. Mieczysław Sygnarski, lektoro de Esperanto en la Jagiellona Universitato de Krakovo, estis distingita per la Kavalira Kruco de la Ordeno de la Renaskiĝo de Pollando. Dum la enmaniga ceremonio en la historia Kopernika salono de la universitato oni nomis la distingiton "nestoro de la polaj esperantistoj".

Harald Schicke, juna esperantisto el Hamburg, varbas nuntempe por Esperanto en la Pedagogia Altlernejo de Bremen. Li estas la unua Hamburgano, kiu dum sia abiturienta ekzameno estis ekzamenita ankaŭ pri Esperanto. Poste li vizitos la altlernejojn en Münster, Dortmund kaj Kolonjo.



Patro Albino Ciccanti el Rimini post dumonata vojaĝo tra skandinavio restadis dum kelkaj tagoj en Hamburg kaj Löhne. Lokaj gazetoj tre detale raportis kun fotoj pri tiu vizito. En la Esperanto-Ekspreso de Pola Radio Patro Ciccanti rakontis pri sia Esperanto-agaĝo en Rimini. Li naskiĝis en la jaro 1930. Dum 18 jaroj li jam laboras por Esperanto. Pro tio oni nomas lin ankaŭ "Pastro Esperanto".

Ludwig Schödl el GDR, en intervjuo kun Pola Radio, diris, ke lia lernolibro "Wir lernen Esperanto sprechen" aperis entute en 12000 ekzempleroj. La unua eldono havis 10000 ekzemplerojn, la dua 2000.
Esperanto en la radio (pp)

La aŭskultebleco variis en la lastaj semajnoj. Ankaŭ Varsovio, kiu ĝenerale estas bone aŭdebla en Nürnberg, kelkfoje suferis je perturboj. Pekino dum la lastaj tri semajnoj entute ne plu estis aŭdebla ĉi tie sur la kutimaj ondoj. Ankaŭ la nova elsendo el Vieno sur la mallongaj ondoj ĝis nun en Nürnberg ne estis kaptebla, kvankam la stacion mi jam trovis. Ĉu temas pri eraro en la horsistemo? Ĝenerale Vieno anoncas siajn programojn laŭ GMT. Kiu jam sukcesis aŭdi Vienon? Zagrebo jam la pasintan jaŭdon respondis al aŭskultantoj, ĉar jaŭde, la 29 nov, la elsendo pro la nacia festotago ne okazos. Bone aŭdebla ĉiam estas Berno, kiu daŭrigis la prelegojn de A. Baur kaj la respondojn al la aŭskultantoj. Merkrede, la 28 nov, oni povos aŭdi la intervjuon de L. Robel kun A. Münnich. Varsovio dum siaj E-Ekspresoj elsendas multajn intervjuojn kun diversnaciaj esperantistoj, kiuj trovas la plaĉon de la aŭskultantoj. Ne mankis problemecaj kontribuoj, tiel la recenzo de Pola Esperantisto n-ro 3 de Jan Klimek. En la leterkesto oni komentis la kontaktojn de la aŭskultantoj kun la redakcio.

Radio Bervalio respondas

D: Ĉu la borplano de UEA povas solvi la energetikan krizon de okcidenta Eŭropo? R: Ne, temas ja nur pri laborplano!

P O L S K I E R A D I O
W a r s z a w a

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Multaj premioj kaj objektaj donacoj

En konkurso de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj okaze de la Jartrideko de Popola Pollando.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la subaj demandoj:

- 1) Kiujn atingaĵojn de Pollando / sociajn, ekonomiajn, kulturajn ktp./ en la periodo de la 30 lastaj jaroj vi opinias la plej interesaj?
- 2) Pri kio karakterisa: nomo, evento, fenomeno, objekto ktp. - vi ekpensas lige kun Pollando?
- 3) Kiujn establenejojn projektitajn aŭ konstruitajn de poloj en via lando aŭ en la mondo vi konas?

La respondojn ni petas sendi laŭ adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso" ĝis la 31 de decembro 1973 j. / decidus la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso estos anoncigitaj en la disaŭdigoj emisiotaj la 31-an de januaro 1974 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn.

Ni deziras al vi bonŝancon!

Polskie Radio